

BULGARA ESPERANTISTO

TEKNIKA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Jarabono: 10 bulgaraj levoj,
0.50 sv. fr. aŭ egalvaloro
Adreso: Sofio, Poŝtkesto 233

Anoncoj: 2 levoj je kvadrata
cm. Anoncetoj: 1 levo je
vorto aŭ mallongigo.

VEKIĜO

La amasa disvendo de esperantaj lernolibroj, la multnombraj esp. kursoj en urboj kaj vilaĝoj kaj la ofta renkonto de verdstelanoj montras, ke Esperanto bone disvastiĝas en Rozlando.

Tiu esperantistiĝo estas tre ĝojiga, ĉar la individua laboro ja estas la solida bazo de ĉiu progreso.

En multaj lokoj eklaboris ankaŭ la esperantistaj grupoj por realigo de komunaj celoj. Tiuj grupoj ĝenerale ne multe floras, eble ĉar ni kiel slava gento, ne aparte ŝatas la „ĝenantajn organizojn“. Tial verŝajne la intereso al la pli alta kaj malproksima organizo — la Bulgara Esperanta Asocio, estas ankoraŭ pli malgranda. Kaj precipe en la nuna akra ekonomia krizo, kiam la penso pri modesta kontentigo de la ĉefaj materialaj bezonoj tiom turmentas nin, la okupo pri organizaj ideaferoj fariĝas vera lukso.

Tamen troviĝas sindonaj oferemuloj, kiel la grupanoj en Dupnica, Petriĉ kaj Tatar-Pazarĝik,

kiuj donis sian ne nur moralan, sed ankaŭ materialan helpon al la Centra Komitato de B. E. A.

Tiu komitato ankoraŭ estas forte embarasata de la pasintjara „heredaĵo“, paralizita de neatenditaj internaj rekonstruoj kaj baraktanta kun kurantaj malfacilaĵoj. Tamen en ĝia nesto elkoviĝis nia „Bulteno“, „Balkana konkordo“ kaj nia „Instituto“, kiuj parolas pri si mem.

Antaŭ ni staras gravaj problemoj, esperantaj ekzamenoj, landa kongreso, kiujn ni povus solvi nur per komunaj penoj. Nia proverbo asertas: „Konkorda anaro montaron detruas“. Ni, esperantistoj, ni devus esti konkordegaj, ĉar ni deziras ne detruo, sed konstrui.

La aliĝintaj ĝis nun grupoj helpis duoble, ĉar ili helpis ĝustatempe. Ilia ekzemplo, kiel viva fakto, tre verŝajne, infektos. Kaj tiel estos helpata ne nur la Landa asocio, sed ankaŭ la ĝenerala esp. movado, ĉar ni ja estas Parto de la Tuto.

Agro

LA C. K. decidis okazigi la **18-an Bulgaran Esperanto-kongreson en Stara-Zagora** kaj ricevis jam la konsenton de la tiea societo pri ĝia aranĝo. La dato estas jam fiksita *19, 20 kaj 21 de Julio*.

Estas elektita la jena *Lo-Ko-Ko* (Loka Kongresa Komitato): prez. Todor Gospodinov, sekretario Nikolaj Vasilkov, kasisto Hristo Karakolev, konsilantoj s-ino P. Deliĉeva kaj f-ino J. Koleva. *Loĝeja komisiono*: Ni-

sim Avramov, Hr. Karakolev kaj N. Gozes. *Amuzkomisiono*: At. Petkov, Dimo Manĉev kaj Ilija Zafirov. *Adreso de Lo-Ko-Ko*: Nikolaj Vasilkov, Smetnata palata, por la 18-a Bulgara Esperanto-Kongreso — Stara-Zagora.

Tiucele estos aranĝita tombolo, ĉiu aĉetu biletojn kaj aliĝu al la kongreso. Kotizo 20 levoj.

La societoj resendu la stumpojn kaj la monon antaŭ la 15-a de Majo.

LA 23-a Universala kongreso de Esperanto okazos la 1—8-an de Aŭgusto, j. k. en Krakovo (Kraków), Pollando. Informojn petu de la Sekretario de la XXIII, Kraków, Lubicz 34, Pollando, kaj de ni. La dezirantoj viziti Krakovon tuj sciigu nin ke ni povu ĝustatempe pripensi la demandon pri karavano kaj pri komuna pasporto. Kongreskotizo 44 Zloty.

:: Bulgara Esperanto-Instituto ::

SCIIGOJ

I. De la Ekzamena Komitato

Dum la XVIII-a Bulgara Esperanto-kongreso, la 19-an, 20-an kaj 21-an de Julio j. k., en Stara-Zagora, okazos ekzamenoj: 1) por elementaj konoj de Esperanto, 2) por scipovo de la lingvo kaj 3) por instrukapablo.

La gesamideanoj dezirantaj esti ekzamenotaj devos direkti petskribon, kun la difinita takso, per la direktoro de BEI al la prezidanto de la Ekzamena Komitato.

Laŭ la statuto de la Instituto (§ 23) ĉiu kandidato pagas: por la unua ekzameno 50 levojn, por la dua — 100 levojn, por la tria 150 levojn.

Al la ekzamenitoj la Instituto donas diplomojn subskribitajn de la direktoro, la sekretario kaj la ekzamenintoj (§ 25).

La horo kaj ejo estos indikataj dum la kongreso.

Ĝis tiam ĉion adresu al: Ekzamena Komitato ĉe la Bulgara Esp.-Instituto, poŝtkesto 233 — Sofia.

Literaturo, laŭ kiu oni povas prepari la ekzamenojn:

R. de Ladevèze — Demandaro;

D-ro A. Möbusz — Dokumentoj de Esperanto;

Edmond Privat — Historio de Esperanto, partoj I & II;

Edmond Privat — Vivo de Zamenhof;
L. L. Zamenhof — Verkaro;
" " — Lingvaj respondoj;
Z. Zahariev — Sintakso.

PROGRAMO DE LA EKZAMENOJ (§ 19)

I. Ekzameno pri elementaj konoj

1. Unupaĝa letero je temo el la ĉiutaga vivo;
2. Unupaĝa priskribo aŭ rakonto je temo el la esperanta movado;
3. Ordinara interparolo en Esperanto — demandoj kaj respondoj je facilaj temoj;
4. Analizo de tekstoj.

II. Ekzameno pri scipovo de la lingvo

1. Unupaĝa letero je temo el la ĉiutaga vivo;
2. Unupaĝa verkaĵo pri la esperanta vivo (historio, organizo, praktika apliko);
3. Mallonga interparolo en Esperanto je facilaj temoj;
4. Analizo de tekstoj. Demandoj el la gramatiko.

III. Ekzameno pri instru- kapablo

1. Verkajo je temo el la Esperanta vivo;
2. Verkajo pri la instruado, pri la lingvo aŭ pri la literaturo;
3. Legado kaj analizo de teksto, gramatikaj demandoj, interparoloj pri la maniero de instruado de Esperanto;

4. Esperanto-leciono — klarigo de gramatikaj kaj stilaj demandoj;

5. Demandoj pri la historio de Esperanto, pri la esp. organizaĵoj aj pri la lingvo mem.

Rimarko. La II kaj III ekzamenoj estas farataj nur en Esperanto. Sofia, 15. IV. 1931

Prezidanto de la Ekzamena
Komitato

At. D. Atanasov — Ada

2. De la Historia Komitato

La Historia Komitato ĉe Bulgara Esperanto-Instituto volas kolekti kaj noti ĉiujn eldonaĵojn por kaj en Esperanto, aperintajn en Bulgario. La tuta laboro efektiviĝos en kelkaj fakoj: 1) periodaj eldonaĵoj; 2) libroj por esperanto en bulgara lingvo kaj 3) libroj originalaj kaj tradukaj en Esperanto. Unue la Historia Komitato ĉe BEI volas atente esplori kaj zorge noti ĉiujn periodajn eldonaĵojn el Bulgario. Entreprenita estas starigo de „Historia biblioteko“ ĉe BEI kiu ampleksos kaj gardos por la estontaj generacioj la supre menciitajn eldonaĵojn. En la nuna momento BEI disponas nur pri malgranda parto el la koncernaj eldonaĵoj. Por havigi al si la necesajn periodajn eldonaĵojn, BEI ĝentile petas ĉiujn bulgarajn redaktorojn de por kaj en esperantaj gazetoj, ke ili bonvolu sendi en du ekzempleroj kolektojn kompletajn de la gazetoj redaktitaj de ili. Per tio la estimataj samideanoj redaktoroj faros gravan kaj valoran helpon al BEI en ties kultura laboro poresperanta. Oni sendu la gazetojn al „Bulgara Esperanto-Instituto“ por Historia Komitato, poŝtenska kutija 233, Sofia.

3. Recenza Komitato

ESPERANTO—MALLONGA LERNOLIBRO ARANĜITA POR AŬTODIDAKTOJ KAJ KURSOJ, en 15 lecionoj kun bildklarigoj en la teksto —

de D. Borisov. Alplenigita kaj prilaborita de Dim. Ivanov kaj Iv. Kovaĉev. — 72 p. 8-o. Formato 16 x 24. Prezo 20 lv. Ruse, 1930.

*

Ĝis nun ni povis ekscii kaj noti aperadon de jenaj gazetoj esperantaj el Bulgario:

„Mondlingvano“ — „Espero“ — „Rondiranto“ — „Unua paŝo“ — „Esperanto“, unua periodo — „Bulgara Esperantisto“, Pleven — „Esperanto“, dua periodo — „Lumo“ — „Semo“ — „Danubo“ — „Telegramo“ — „Kulturo“, unua periodo — „Bulgara Esperantisto“, Sofia — „Homeco“ — „Esperanto“ de BEA — „Liberio“ — „Esperantista gejunularo“ — „Verda Stelo“ — „Nova Stelo“ — „Balkana Laboristo“ — „Kulturo“, dua periodo — „Bulgara Stelo“ — „Konsolo“ — „Balkana Konkordo“.

Ni estas certaj, ke krom ili aperadis ankoraŭ multaj aliaj. Kiu scias pri aperado de aliaj gazetoj esperantistaj en Bulgario, tiu bonvolu komuniki tion tuj al BEI.

La Historia Komitato ĉe BEI kore dankas al volontaj kunlaborantoj kaj helpantoj.

Stefan Masserof,

prez. de Historia Komitato ĉe BEI

Verko celanta, laŭ la aŭtoro, respondi al la granda nuna bezono pri praktika lernilo servonta al aŭtodidaktoj kaj kursoj.

Jam en la komenco ni legas, ke „Есперанто е сборъ отъ междуна-родни думи, добили гражданство въ почти всички културни езици и познати на мнозина“. Ĉu efektive ĝi prezentas tiajn?

Oni ne rimarkas sistemon kaj konsekvecon en tiu ĉi libro: jam en la dua leciono estas uzataj la multnombro, la sufikso „-et“ kaj preterito (is-tempo) kaj la aŭtoro klarigas ilin en la tria.

La aŭtoro kaj liaj helpantoj evidente ne konas bone la apartajn gramatikajn kategoriojn: sur paĝo 17 ni legas ke „Условно наклонение (кондиѝа modo) се образува, като се замѝни инфинитивното окончание „i“ съ окончанието „us“ за условие (безразлично за ед. и мн. число и всички родове).

Por ili la verbo havas ne nur genron, sed ankaŭ kazojn (p. 8)!

Sur paĝo 14: „Въ есперанто имаме само два рода: мжжки и женски. Срѝденъ родъ нѝма“. Certe el ĉiuj esperantistoj loĝantaj sub la suno nur la tri kunaŭtoroj ne scias ke en esperanto ne ekzistas gramatika genro.

Subjunktivo ne ekzistas por ili. Sur paĝo 33 la aŭtoro penas distingi la infinitivon: „Това е погрѝшно, защото имаме не инфинитивъ, а повелит. (?) наклонение“ kaj donas ekzemplon: „mi deziras, ke vi kantu“.

La ĝenerala nescio pri la uzo de la akuzativo estas rimarkebla tra la tuta libro: Sur p. 35: „Diru ankaŭ via familia nomo. — Bonan nokton, amiko, mi iras en mia ĉambro por dormi“; sur paĝo 36: „Ĝi konsistas el lakto, teo, kaj pecon da pano...“

La esprimoj „malplej bela“ kaj „plej malbela“ estas por li samsignifaj: p. 38 kaj 43.

Sur p. 53 ni trovas: „Страдателно причастие (pasivaj verboj de participo) (?)“. Ekzemplo sur p. 56: „La hundo de tiu ĉasisto baldaŭ atingos la vunditan leporon kaj estos alportota al vi“. Kiu? Kion, aŭ kiun?

P. 63; Междуиметията.

Krom ĉio ĉi kaj la tre abundaj preseraroj, la aŭtoro erare kaj malklare tradukas kaj klarigas vortojn ofte uzatajn:

arko — джга (небесна) p. 27

serĉi — шегувамъ се p. 56 kaj 57

butero — масло (чисто) p. 56

lardo — масло (свинско) p. 56

prunti — заемамъ въ заемъ па-ри p. 61.

La bildoj kun multaj trafaj ekzemploj estas prenitaj el la bonega lernolibro „Universala Esperantist-igilo“ de D-ro Benson, sed, kompreneble, ili ne povas altigi la valoron de la verko.

Multaj reguloj estas donitaj severe sciencaj kaj tial konfuze malklaraj ankaŭ por la aŭtoroj mem.

La aŭtoroj ne scias regule la nomon de la aŭtoro de Esperanto. En la lastaj linioj sur p. 4 kaj sur p. 3 de la kovrilo ni renkontas „Замѝн-ховъ“.

Koncize ni povas diri: Verko de aŭtoro ne konanta bone la lingvon, reviziita de same ne bonaj esperantistoj; la libro taŭgas nek por aŭtodidaktoj, nek por kursanoj. Ve, al tiuj kiuj volus lerni la lingvon per ĝil! Similaj verkoj portas grandan malutilon por nia movado kaj grandan krimon faras la aŭtoroj, verkantaj tiajn. S. St. H.

— S-RO P. PAMPOROV, Margrietas str. 14-5, Riga, Latvio, serĉas korespondantojn por siaj gekursanoj.

— AT. D. ATANASOV (Agro), Ĉatalĝa 61, Sofia 4, kolektas po 70 lv. da abonpago pri „Sciencia bulteno“.

AT. D. ATANASOV — KURSO DE ESPERANTO POR BULGAROJ. Sepa relaborita eldono — Sofia, 1931. Pĝ. 112, 8^o. Eldonis Centra Librejo „Esperanto“ — Sofia. Prezo 25 levoj (1 sv. fr.).

La nova — sepa — tute relaborita eldono de la konata lernolibro enhavas kvin partojn: 1) alfabeto; 2) kurso; 3) gramatiko kaj afiksaro; 4) legolibreto kaj 5) bulgarlingva traduko de la lecionoj. Parto unua estas destinita por ne tre instruitaj personoj, nekonantaj la latinan alfabeton. Laŭ aranĝo ĝi tre similas al la lernejoj abocolibro.

Precipante atenton kaj laŭdon meritas la dua, la esenca parto, kiu enhavas 22 lecionojn — kun legaĵoj pri apartaj temoj el la ĉiutaga vivo, demandoj kaj konversaciaj esprimoj. La legaĵoj estas lerte aranĝitaj — ili estas mallongaj, koncizaj kaj altrafaj. Nenio superflua, nenia manko. Evidentas certa primetoda sento. Lingvo — perfekta, laŭfundamenta. Post ĉiu leciono estas indiko pri la koncerna paragrafo de la gramatika parto.

Ĉiu gramatika regulo estas klarigata mallonge kaj ĝuste. La afiksoj

estas donataj per tipaj frazoj, facile memoreblaj.

La legolibreto enhavas anekdotojn, proverbojn kaj versojn. La bulgarlingva traduko de la lecionoj estas bonega.

La libron ilustras pli ol 80 kliŝoj.

Post multaj lecionoj estas presitaj pensoj kaj opinioj de famaj scienculoj kaj filozofoj pri la internacilingva demando kaj Esperanto.

Preso bona. Preseraroj preskaŭ mankas. En la dua leciono mankas indiko pri § 5 de la gramatika parto (pri la posedaj pronomoj). En la dekunua — indikita § 8, anstataŭ § 9 (pri kondicionalo kaj imperativo).

Estas konsilinde, ke en ĉiu leciono la nova lingva materialo (afikso aŭ gramatika regulo) estu diklitere montrata per la koncernaj vortoj kaj frazoj. Pri la legolibra parto: estas dezirinda ioma pliampleksigo. Ĝia materialo refreŝigenda per verkajoj de pli modernaj esp. aŭtoroj.

Ni esperas, ke la nova eldono de la lernolibro de s-ano At. D. Atanasov trovos disvastiĝon, kian ĝi plene meritas. Ni varme rekomendas ĝin al ĉiuj kursgvidantoj kaj aŭtodidaktoj!

T. K. P.

ĴUS APERIS LA SEPA TUTE RELABORITA ELDONO DE **Kurso de esperanto por bulgaroj**

de ATANAS D. ATANASOV — ADA

Lernolibro por aŭtodidaktoj kaj kursoj, enhavanta 5 partojn: 1) alfabeto; 2) kurso kun 22 lecionoj; 3) gramatiko kaj afiksaro; 4) bulgarlingva traduko de la lecionoj kaj 5) legolibreto. La tekstojn ilustras multaj kliŝoj.

Preso bona. Prezo modera — 25 levoj (1 sv. fr.).

Ĉiam nur en antaŭpago! Al la grupoj — kutima rabato. Mendu de la eldonanto:

CENTRA LIBREJO „ESPERANTO“
Bulv. „Maria Luiza“ № 38, Sofia

Pri la mondvojaĝo de s-ro J. R. Scherer

La Internacia Centra Komitato de la Esperanto-movado en Genevo ĵus publikigis la programon pri la propagandvojaĝo de s-ro J. R. Scherer tra Eŭropo. Laŭ ĝi, s-ro Scherer restos en Bulgario 12 tagojn—de la 19-a de Novembro ĝis la 1-a de Decembro j. k. La definitiva programo, kun precizaj datoj, estos publikigata la 1-an de Julio 1931.

La societoj dezirantaj inviti s-ron Scherer en siajn urbojn, turnu sin al la komisiito de la Bulgara Esp. Asocio — s-ro Dimitr Ivanov, str. „Prista“ 28 — Ruse, kiu aranĝos la vojaĝon de la propagandisto tra Bulgario. La invitojn faru antaŭ la 15-a de Junio, ĉar post tiu dato la jam aranĝita programo ne estos ŝanĝebla. Minimuma honorario por prelego estas 10 usonaj dolaroj.

Nepre averto al la invitantaj so-

cietoj: Jam tre frue oni ne disfamigu pri la entrepreno, havanta poresperantan karakteron. La spertoj faritaj ĝis nun devigas rekomendi, ke la invitantoj kaj preparantoj de paroladoj ne tro akcentu la Esperanto-karakteron de la aranĝo. Oni do ne organizu tedan reklamon por Esperanto. La impresado devas esti, ke ni donas unikan helpon per bonega parolado kaj ne ke ni petas subtenon por Esperanto. Ni ne devas enkonduki s-ron Scherer kiel esperantiston, sed kiel fakulon, kiu ĉirkaŭvojaĝas la mondon. Por la ne-esperantista publiko Esperanto devas havi la signifon de nura helpilo. Se ni ne uzas tiun ĉi taktikon, estos tre malfacile atingi intereson de ne-esperantistaj rondoj por parolado kun honorario kaj la sukceso estos tre malgranda.

Enlanda kroniko

Svištov. En la komercgimnazio kurso por komencantoj ekde la 1-a de Marto; gvidanto s-ro M. Rusenov. Fondota societo.

Mesemvrija. Ekde la 8-a de Marto kurso por kom. en la legejo ĉiuvespere; gvidanto Iv. Momĉilov.

Varna. Aranĝitaj 5 kursoj el kiuj 3 jam sukcese finitaj; kursgvidantoj: Hr. Angelov, G. Dolapĉiev, G. Kovaĉev, St. Pizarov kaj Art. Taverĵian. Brille aranĝita verda semajno. Ĉiuj jurnalaj plej favoraj al Esperanto. Entuziasmigaj kaj rezultodonaj renkontoj, ekskursoj kaj amuzvesperoj.

Haskovo. Sukcese finiĝis kurso por komencantoj kun 8 membroj kaj ĉiuj abonis „Bulgara Esperantisto“n; gvidis Delĉo Vasilev—instruisto.

Ruse. Nova kurso ekde la 10-a de Marto, kun 35 partoprenantoj; gvidanto D. Ivanov.

Tatar-Pazarĝik. Du kursoj por komencantoj, gvidataj de Penko Stoev, I. Konstantinov, J. Lupov, N. Jotov kaj B. Danon.

La 17-an de Januaro aranĝita impona vesperfestado en la teatra salono „Odeon“.

Malfermata supera kurso por perfektigo; gvid. P. Stoev.

Samokov. Estraro de la loka societo „Radio“: prezidanto f-ino T. Popangelova, vicprez. Georgi N. Vecov — instruisto, sekretario-bibliotekisto Boris M. Bosev — komercisto, kasisto Al. Z. Popov, konsilanto f-ino Sl. Popbojilova.

Kontrola komitato: prez. St. Gigov, membroj: f-ino M. N. Velčeva kaj Stefan D. Jončev.

Stara-Zagora. La loka s-to „Verdstelano“ akceptis aranĝi la 18-an Bulgarian Esperanto-Kongreson kaj jam vigle laboras; elektita Lo-Ko-Ko kun prezidanto Todor Gospodinov. Adreso — Nikolaj Vasilkov, Smetnata palata.

Vidin. Kurson gvidas laŭ la „Ĉe“-metodo d-ro Velkov. Aranĝita kristnaska vesperamuzo. Nova estraro: prez. N. Hristov — juĝisto, vicprez. d-ro Velkov, sekretario D. Puev, kasisisto G. Simeonov. Ĉiulunde amikaj kunvenoj.

Ŝumen. La loka societo aranĝis, la 15-an de Februaro, grandan esperantistan koncerton; ĉe la komenco la prezidanto Il. Silvestriev paroladis pri Esperanto kaj ĝia signifo.

Dupnica. La loka s-to renomiĝis je „Rila Verda Stelo“ (antaŭe „Suno“). Nova estraro: prez. K. Georgiev, sekretarikas. K. Slavov, bibl. N. Izrailov; kontrola komitato: B. Drenski kaj Adela Eskenazi. Luita nova pli vasta kaj bela klubejo.

Debnevo (Trojan'a). Malfermita kurso; gvidanto Penčo S Dalekov — instruisto. Fondita loka grupo.

Sliven. Kurso gvidata de d-ro St. Kadiev.

Sofio. La loka s-to regule kunvenadas ĉiujaŭde en legejo „Hristo Botev“ — prilingvaj diskutoj kaj gajaj intimaj vesperoj. Nova estraro: prez. Sim. Hesapčiev, sekr. Nojarova, kas. D. Stojanov, helpkasisto Ĉoĉev.

Pernik. La kurso por ministoj, kiun gvidis s-ano P. Mihajlov — studento, estis fermita, post sukcesa laboro, la 2-an de Aprilo j. k.

Batanovci. Kurson gvidas la s-noj Dragomir Nikolov kaj Neofit Spasov ekde 1. IV. j. k.

Vratca. La 7-an de Februaro j. k. la societo „Sukceso“ aranĝis bone vizititan vesperamuzon en la loka teatra salono „Razvitie“. Krom la ceteraj esperanto-numeroj, specialan intereson vekis la originala „kvaropo“ el 5 jaraj knabinetoj, bonege ludintaj mallongan simblan sceneton. La publiko meritinde aplaudis.

La 28-n de Februaro j. k. finiĝis la ĉi vintra esperanto-kurso por geurbanoj, gvidita de s-no R. K. Triĉkov.

El 20 gekomencintoj 6 finis kun distingo. La finintoj estas laboristoj.

Sciigoj

— Ni dankas al la esp. societo en Petriĉ pri la pagitaj 40 abonoj kaj al la s-to en Samokov pri 20.

De ĉiu urbo ni atendas arajn abonojn.

— La samideanoj, havantaj radioaparatojn, skribu al „Predavatel „Rodno Radio“ — Sofia“, ke ili volas aŭskulti ankaŭ disaŭdigon en Esperanto.

— Ĝojiga fakto estas la reviviĝo de „Literatura mondo“. En la dua numero jam estas la ĉefrakonto de nia beletristo Pančo Mihajlov „La ruĝa dianto“. Nepre abonul

— La 25-an de Februaro niaj delegitoj — G. Aktarĝiev kaj At. D. Atanasov — Ada, intervjuis la ministron de la popola klerigado, s-ron Aleksandro Cankov, pri la rilatoj de la ministerio al la Esperanto-movado en Bulgarujo kaj pri eventuala nuligo de la cirkulero, kiu malpermesas la instruadon de Esperanto en la bulgaraj lernejoj, subskribita de la eksministro N. Najdenov. S-ro Cankov promesis pristudi la demandon kaj raporti ĝin en ministrara kunsido, ĉar li opinias ke tiu demando estas de la kompetenco de la registaro.

Bibliografio

R. N. Coudenhove — Kalergi — Paneurope. Questions et réponses. Pĝ. 32, 8^o. Editions Paneuropéennes — Vienne, Hofburg;

R. N. Coudenhove — Kalergi — Projet d'un pacte paneuropéen. Pĝ. 22, 8^o. Sama eldonejo.

Ambaŭ broŝuroj traktas franclingve la aktualan en la politika mondo temon pri Paneŭropo. Elirinte elsub la plumo de la ideologo mem de la paneŭropa ideo, ili prezentas al ni la motivojn, esencon kaj la celojn de la samnoma movado.

Hura!, romano de Julio Baghi, kaj Orfeo — scienca studo de prof. Janko Todorov. Pri la du lastaj alifoje.

„Pacon al vi“ de P. Dănov, n-ro 6 — 7 de „Nova kulturo“, j. II.

La mnemonika instituto de prof. D. Fajŝtejn, Vilno (Pollando), Zawalna, № 15/11.

GAZETOJ KAJ REVUOJ:

Esperanto — Genève, j. XXVI, № № 1, 2, 3, 4;

Literatura mondo — Budapest, j. I, № № 1, 2;

Balkana Konkordo — Sofia, j. I, № № 1, 2, 3, 4;

Heroldo de Esperanto — Köln, j. XII, № № 1, 2, 3, 4, 5, 6;

Rivista Italiana d' Esperanto — Udine, jaro XVII, № № 11, 12;

Oomoto — Kameoka, Jap., j. VII, № № 1, 2;

Oomoto Internacia — Paris, j. VI, № № 50, 51;

Amerika Esperantisto — Fort Lee — USA, 1931, № № 3, 4;

Argentina Esperantisto — Buenos-Aires, 1930, № 51—56;

La Revuo Orienta — Tokio — Jap., j. XII, № № 1, 2, 3, 4;

Verda Mondo — Kameoka — Jap., j. VII, № 1;

International Language — London, j. VIII, № 2;

The British Esperantist — London, j. XXVII, № 311—313.

Junulara Ligo de Nagasaki — Nagasaki Jap., 1930, № № 9, 10, 11;

La Espero — Hankow — Ĉinio, j. I, № 12;

La Komerco — Dresden, Germ., 1931, № 14;

Aŭstria Esperantisto — Wien, j. VII, № 12, j. VIII, № 1;

La Socialisto — Wien, j. VI, № № 1, 2;

Katolika vivo — Paris, j. I, № № 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8;

Skolta Heroldo — Paris, j. V, № 45;

La Unuigita Tuthomaro — Hamburg, 1930, № 10;

Litova Esperanto-Revuo — Kaunas, j. II, № 9—12;

La Interligilo de l' P. T. T. — Paris, j. VIII, № 101;

Arbeiter Esperantist — Berlin, j. XVII, № № 1, 2;

La Dordrehta Esperantisto — Dordrecht — Nederlando, j. III, № 25;

Bulteno de I. S. A. 1931, № 21;

Paginas Selektas — Guayaquil-Ecuador, j. V, № № 62, 63, 64.

Fluganta skribilo — Issy-Francio, j. XIX, № 62;

Internacia Stenografisto — Issy-Francio, j. IX, № 36;

Monda Kuriero — Sarajevo (Jugoslavio), j. II, № № 1—2;

La Verda Lumo — Shanghai (Ĉinio), vol. 7, № № 9—10.

Esperanto Tidningen — Stokholm (Sved.), j. 1931, № № 1, 2;

Internacia Pedagogia Revuo — Dresden (Germ.), j. X, № 1;

Espero Katolika — Paris, j. 27, № 91.

: : Presejo POSREDNIK — Sofia : :